A contribuição das instituições filiadas tem cooperado eficazmente para a boa colocação do Brasil no Concurso Internacional. Pelos resultados publicados no "Esperanto" de U.E.A., número de Junho último, o Brasil estava em

## ESPERANTO CE NIA TUTLANDA PARLAMENTO



*Deputito Fernando Ferrari*

En alia loko de nia organo ni presas la originalon kaj tie ĉi tradukon de la jam mondfama projekto de Deputito Fernando Ferrari, kiu brile ĝin defendis per homarana argumentado.

### LEĜO-PROJEKTO N-RO 624 — 1951

*Tiu ĉi leĝo estigas Specialan Komitaton ĉe Palaco Itamarati, por studi kaj stimuli la alprenon, fare de la landoj, de neŭtrala lingvo internacia.*

(De S-ro Fernando Ferrari)

La Nacia Kongreso dekretas:

Art. 1-a. — Brazilo klopodos ĉe la landoj kun kiuj ĝi havas diplomatajn rila-

3º lugar, com 120,0 %, logo depois da Finlândia, com 126,7 %, e da Alemanha, com 122,1 %.

O número de pontos de cada um dos 3 países era: Brasil, 3005; Alemanha, 2930; Finlândia, 2555.

Em números absolutos o nosso país ocupava o 5º lugar, depois da Grã Bretanha, França, Holanda e Suécia.

Esperamos que cada instituição esperantista se esforce por vencer o concurso. E que tôdas juntas assegurem a vitória do Brasil.

tojn, por la alpreno, fare de ĉiuj landoj, de neŭtrala lingvo por internaciaj rilatoj.

*Paragrafo sola.* — Oni prefere alprenu Esperanton.

Art. 2-a. — La Brazila propono enhavu la jenajn fundamentajn kondiĉojn:

a) — La alprenota lingvo estu devige uzata en la internaciaj rilatoj;

b) — Se la nacioj aliĝintaj al O.N.U. uzos naciajn lingvojn por internaciaj dokumentoj, tiaj dokumentoj kunportu tradukon en la neŭtrala lingvo internacia;

c) — La kondiĉo de la litero *b* estu uzata por la internacia komerco;

d) — La alpreno de la internacia lingvo ne forpuŝu en la internaciaj rilatoj la limititan uzadon de la naciaj idiomoj kiel helplingvoj internaciaj.

Art. 3-a. — Ĉe la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj estiĝu Speciala Komitato kies celo estu la esplorado kaj alpreno de neŭtrala lingvo internacia kaj kiu faru la necesajn paŝojn por la plenumado de tiu ĉi leĝo.

*Paragrafo sola.* — Tiu Speciala Komitato havu kvin membrojn, elektitajn de la Prezidanto de la Respubliko, inter kiuj estu la Ministro de Eksterlandaj Aferoj, kiel ties natura prezidanto, la Direktoro de la Politika kaj Kultura Departemento de Itamarati, po unu reprezentanto de la Ministerio de Edukado kaj Sano, de la Brazila Instituto por Scienco, Edukado kaj Kulturo, de la Brazila Esperanto-Ligo.

Art. 4-a. — En sesdek tagoj post aprobo de tiu ĉi leĝo, la Plenuma Potenco eldonu la regularon por ĝia plenumado.

Art. 5-a. — Tiu ĉi leĝo ekvalidos en la dato de sia publikigo kaj malvalidigos la leĝojn kontraŭ ĝi ekzistantajn.

(Subskribite) *Fernando Ferrari.*

(El «Diário do Congresso Nacional», de la 12-a de junio, 1951, paĝoj 3845/6).

## XIII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

### AGADO DE LA O. K.

En nia antaŭa numero ni jam menciis, ke niaj nordorientaj samideanoj brile laboras por nia 13-a tutlanda kongreso, efektivigonta de 9 ĝis 16 de februaro, 1952, en la ĉarma ĉefurbo de Pernambuco, alnomata Brazila Venecio pro sia simileco je la poeziplena itala urbo prikantata de verkistoj kaj poetoj tra la mondo.

Kiu pasigas semajnon en kongresurbo, tiu ordinare ne komprenas kiom da laboro postulas dum pli ol unu jaro la preparado de sukcesplena kongreso. Mil problemojn devas solvi la O.K. ne nur sur la loko, sed ankaŭ en aliaj regionoj proksimaj kaj malproksimaj de la kongresurbo. Tion tre klare nun lernas niaj fervoraj samideanoj en la Nordoriento de Brazilo.

La O.K. por la 13-a estas jena:

Prezidanto — Tomás Tenório Vila Nova

1-a Vicprezidanto — Alfredo de Azevedo

2-a Vicprezidanto — Ernesto Dinis

3-a Vicprezidanto — Francisco Ristal

Ferreira

Ĝenerala Sekretario — Moacir S. Cunha

1-a Sekretario — D-ro Fernando Larocca

2-a Sekretario — F-ino Iara Arteiro

3-a Sekretario — Adalberto Fonseca

Kasisto — S-ino Nazaré Buononato

Helpkasisto — S-ino Maria Elisa Guimarães.

La adreso estas Av. Guararapes, 86 — Edifício Santo Albino — 11º andar, sala 1110, Recife, Pernambuco. Por leteroj: Caixa postal 555, Recife, Pernambuco, Brazilo.

Sub la aŭspicioj de la Direkcio de Dokumentaro kaj Kulturo de la Komunumo estis aranĝita tutlanda konkurso por desegnado de afiŝoj pri la Kongreso. Lerte anoncita, tiu konkurso vekis intereson de desegnistoj tra la tuta teritorio kaj 45 konkurantoj prezentis verkojn por juĝado.

En la sidejo de la Direkcio de Dokumentaro kaj Kulturo, la 11-an de junio, 1951, kunvenis la Juĝantaro jene formita: S-roj Pelópidas Silveira kaj Lula Cardoso

Aires, profesoroj ĉe la Lernejo de Belartoj; Hélio Feijó, arkitekto; Aluísio Magalhães, pentristo; José César Regueira Costa, Direktoro de la Dokumentaro kaj Kulturo de la Komunumo; Alfredo de Azevedo kaj Pastro Pedro Melo, el la O.K. por la 13-a.

Sub prezido de Ing. Pelópidas Silveira la Juĝantaro decidis unuanime, aljuĝinte la premiojn jene:

1-a — Premio «Lazaro Ludoviko Zamenhof», Cr\$ 5.000,00, al S-ro Hormínio Moura Neto, loĝanto en Cambucí, ŝtato São Paulo.

2-a — Premio «D-ro Couto Fernandes», Cr\$ 3.000,00, al F-ino Lourdes Marques Lins, en Recife, Pernambuco.

3-a — Premio «Odilon de Araujo», Cr\$ 1.000,00, al F-ino Elisabeth Magalhães, en Rio de Janeiro.

En la 14-a kaj 15-a de julio la O.K. kunvenos en João Pessoa, ĉefurbo de ŝtato Paraíba, kie efektivigos la 2-a Konvencio de la Nordorientaj Esperantistoj por festi la 64-an datrevenon de Esperanto kaj labori por la 13-a. Ni jam ricevis detalan programon por tiuj kunsidoj. Estas dekoj da gravaj temoj diskutotaj en João Pessoa dum du tagoj. Nur kelkajn ni povas menciiti tie ĉi:

a) — Starigi programoj por samtempa instruado de nia nacia lingvo kaj de Esperanto, por plialtigi la ĝeneralan kulturnivelon de la popolo. b) — Varbi la apogon de la ŝtatestroj de nordorientaj ŝtatoj por la movado kaj la Kongreso. c) — Akiri senpage aŭ malkare vojaĝajn facilecojn por la kongresanoj. ĉ) — Reaperigi la gazeton «Pernambuka Esperantisto», dormantan jam de kelkaj jaroj, kaj fondi nordorientan Esperanto-revuon.

La 1-a simila Konvencio efektivigis en Recife en decembro de 1950 kaj multe laboris.

Ĉiuj laboroj de la O.K. aperas en detalaj protokoloj pri la kunsidoj kaj estas disvastigataj per multobligitaj folioj; tial la preparado de la 13-a estos modelo por estontaj organizantoj de E-Kongresoj en la lando.

Esperable la Kongreso estos granda sukceso, kaj propagando jam farita de la O.K. ne estas birdo kaptota.

I. G. B.

## ESPERANTO NA IMPRENSA DO BRASIL

Tivemos conhecimento de artigos e informes sôbre o Esperanto, nos periódicos:

AMAZONAS — “Diário da Tarde”, de Manaus.

RIO GRANDE DO NORTE — “Diário de Natal”.

PARAÍBA — “A União”, de João Pessoa.

PERNAMBUCO — “Diário de Pernambuco”: Porque só vingou o Esperanto, I.G.B. — “Esperanto, língua bem viva”, a secção dominical de Calinício Silveira, sempre noticiosa e atrante. “Diário da Manhã” — “Esperantismo e Esperanto”, secção de Moacir S. Cunha; “O Monitor”, órgão da Ação Católica de Garanhuns; “A Defesa”, de Caruarú.

BAÍIA — “A Razão”, “A Bahia”, de Salvador.

SÃO PAULO — “A Noite”, “A Época”, “A Gazeta”, “Folha do Norte”, “Folha da Manhã”, “Folha da Noite”, “Diário de São Paulo”, “Diário Popular”, “Diário da Noite”, “A Hora”, “Vida Rotária”, “Jornal de Notícias”, “Jornal de São Paulo”, “Deutsche Nachrichten”, “O Estado de São Paulo”, “Correio Paulistano”, “O Tempo”; — Expositor Cristão, art. de G. Freitas. “Cruzeiro do Sul”, de Sorocaba. “A Tribuna”, de Santos; “Português”, revista mensal para o estudo do idioma nacional, com excelente artigo de F. S. Almada, sôbre as vantagens do Esperanto no ensino de outras línguas. “Diário da Manhã”, de Ribeirão Preto.

RIO GRANDE DO SUL — “Folha da Tarde”, “Diário Oficial” (25-7), “Reencarnação”. “Revista CEUC (do Centro dos Estudantes Universitários de Engenharia, de Porto Alegre — artigo de Alberto Flores. “Jornal do Dia”, “Idade Nova”, de Porto Alegre.

DISTRITO FEDERAL — “Jornal do Brasil” e “A Noite”, entrevistas com Frei João B. Kao; “O Globo”, “Correio da Manhã”, “Diário de Notícias”, “Revista da Semana”, “Seleções de Enfermagem”, n.º 1 de interessante revista, de que é administrador nosso samideano Celso Rosa. “Reformador” — Em todos os números traz artigos e poesias em Esperanto. No número de Julho trouxe o texto da circular da Grécia sôbre o ensino do Esperanto; no número de Agosto traz o artigo “Problemas de linguagem”, de Ismael G. Braga, publicado no “Jornal do Comércio” de Recife. “Revista Brasileira de Estatística” — Traz extensa descrição do 12.º Congresso de Esperanto, com as moções apresentadas ao Congresso.

MINAS GERAIS — “Gazeta Comercial” de Juiz de Fora: Transcreveu da revista “Américas” o artigo do Sr. Afonso Correia — “O Pandemônio das línguas”. “Estado de Minas”,

## DUMVIVAJ MEMBROJ

Ĝis 1950 estis neniuj dumviva membro de U.E.A. en Brazilo.

Nia enlanda movado estas granda kaj persistema. En iuj sencoj ĝi estas rimarkinda; ekzemple, pri oficiala apogo de diversaj tutlandaj, ŝtataj kaj komunumaj registaroj kaj praktika uzado de la lingvo fare de registaroj; la eldonado de Esperanto-libroj kaj libro-servoj; la eldono de poŝtmarkoj memorigaj pri okazintaĵoj en la Historio de Esperanto; efika organizado de gazeto-servoj; persistema propagando per radio k.a. ni iom povas fieri; sed koncerne al organizado, ĝis nun, ni ne multe sukcesis.

Ĝis nun ni havis neniun kompetentan kaj ageman varbanton por B.E.L. kaj U.E.A. La pli malfacilaj laboroj — propagando kaj instruado — estas farataj kun laŭdinda entuziasmo tra la tuta lando, de diligentaj samideanoj, sed post la fino de la kursoj la nove bakitaj esperantistoj restas ekster niaj mond- kaj landorganizaĵoj, kiel individuaj agantoj.

Nun du samideanoj ekmontras per agado sian kompetenton pri varbado kaj donas al ni la esperon, ke eble nova epoko komenciĝas ankaŭ en tiu senco por nia movado. Ili ambaŭ estas kleraj advokatoj kaj espreble scios brave defendi nian aferon.

D-ro Wilson Veado, juĝisto en Coração de Jesus, Minas Gerais, varbis la unuan Patronon kaj plurajn Subtenantojn en sia urbo. D-ro Miguel Timponi, advokato en Rio de Janeiro, Vicprezidanto de Brazila Klubo «Esperanto», varbis ĝis nun kvar Dumvivajn Membrojn, kies nomoj estas: D-ro Hugo Ramos, ĉefurba leĝfaranto; Farmaciisto Zeŭs Wantuil, D-ro José Miranda Ludolf kaj D-ro Arthur Lins de Vasconcellos Lopes.

Tiuj estas imitindaj ekzemploj por ni ĉiuj.

“Folha de Minas”, “Diário de Minas”, “Diário da Tarde”, “Minas Gerais”, de Belo Horizonte, trouxeram noticias detalhadas, com clichês; da inauguração do monumento a Zamenhof.

## BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS — *Manaus* — Laŭ artikolo de nia samideano S. Augusto en la gazeto «Diário da Tarde», Rádio Difusora do Amazonas decidis komenci elradii sciigojn pri Esperanto. Tion oni dankas al Pastro Pedro Motta kaj S-ro José Claudio de Souza.

PARAÍBA — *João Pessoa* — 250 lernantoj en la Kolegio — Instituto Monsenhor Walfredo — ĵus fondis Esperanto-Klubon, dum kunveno prezidita de D-ro João Fernandes de Lima, vicŝtatestro, kun la ĉeesto de aŭtoritatoj kaj de la prezidanto de la Academia Paraibana de Letras. La unua estraro konsistas el prof. Manuel Nery, prez.; Euziria Batista, sekr.; José H. Vasconcelos, kas.; Nereusa Nóbrega Nery, bibliot.

BAHIA — *Salvador* — Ankaŭ tiun ĉi jaron la Urba Konsilantaro donis subvencion al Esperanta Grupo de Bahia. Ĝi ricevis kiel monhelpon 13.000 kruzejrojn, por plibonigi sian instalaĵon.

— En la Kolegio Antônio Vieira pastroj Borges kaj Lima gvidas Esperanto-kurson, ĉiuvendrede. La kurso estas deviga al ĉiuj unuajaraj gimnazianoj, kiuj estas pli ol cent lernantoj.

SÃO PAULO — *São Paulo* — La «Escola Profissional Feminina D. Pedro II» (Virina Metilernejo Petro Dua) donas ĉiutagan lecionon pri Esperanto, kiun instruas nia samideanino Alice Pereira.

— *Santos* — S-ro José Octávio de Carvalho sciigas ke li nomis sian horloĝistan laborejon — «Samideano», kaj la anonca tabulo enhavas ankaŭ verdan stelon.

— *São Miguel Paulista* — La nova estraro elektita por la periodo 1951-1952 estas: Prez. Darmy Mendonça; vicprezid. João B. Silva; ĝen-sekr. P. Radosavehevitch; 1-a sekr. B. Sforsin; 2-a sek. Floriza F. Oliveira; 1-a kasisto Oscar M. Barros; 2-a kas. J. Martins; bibliot. O. P. Holanda; prop-ĉefo Isaac C. S. Camargo.

— *Bauru* — Denaska esperantisto Gilberto F. Bartolomeu sciigis ke li alvenis la 5-an de Junio kaj estas gasto de ges-roj Luiz Bartolomeu. Sinceran gratulon!

— *Ourinhos* — Nia samideano D-ro João Jorge Cordeiro, kiu estis unu el la fondintoj de Sorokaba Esperanta Klubo, translokiĝis al urbo Ourinhos, kie li propagandas nian lingvon kaj klopodas por revigligi antaŭe ekzistantan grupon. Li jam faris du paroladojn pri Esperanto en la lokaj framasona loĝio kaj Rotary-Klubo, kaj komencis fari Esperanto-kurson. Bonan sukceson!

MINAS GERAIS — *Barbacena* — S-ro Gentil Capuano Amrain informas pri Esperanto-Kurso, kies gvidanto li estas. Bonan sukceson, kaj deziron pri baldaŭa fondo de grupo en tiu bela urbo de ŝtato Minas Gerais.

RIO DE JANEIRO — Pluraj Esperanto-Kursoj kiuj okazas en nia ĉefurbo:

Ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praça da Republica, 54, 1.º; Associação Esperantista do Rio de Janeiro, rua Juan Pablo Duarte, 19-2.º; Aliança Divino Pastor, rua Ataulfo de Paiva, 1120, 1.º; Brazila Klubo-Esperanto, Praça da Republica, 54, 1.º. En antaŭurbo Bangu, rua Silva Cardoso, 269. Esperanto-Klubo de A. C. M., rua Araujo Porto Alegre, 36; Esperanto-Rondo de Olaria, rua Filomena Nunes, 685; Externato São José, Irmãos Maristas, Rio Comprido; Federação Espirita Brasileira, Av. Passos, 30-1.º; Gremio Literario Com. Rainho, rua Senador Dantas, 118-1.º; Radio Ministério da Educação, Praça da Republica, 141-A.

## NEKROLOGO

JOSÉ REGANATTI

Forpasis, en ĉefurbo São Paulo, la 16-an de Aprilo, nia samideano José Reganatti. Li multe klopodis por la enkonduko de propagando de Esperanto en la tiea gazetaro, kaj estis redaktoro de la oficiala organo de São Paulo Esperanto Klubo — «S. Paulo Esperantista», kiu aperis dum la jaro 1947.

## RECENZO

Ferenc Szilágyi — INTER SUDO KAJ NORDO 186-paĝa, formato 13 x 19 cm. Eldonita de Eldona Societo Esperanto — Stockholm — 1950. Prezo Cr\$ 50,00 en la Libro-Servo de B.E.L.

\* \* \*

Ĝi estas kolekto da rakontoj originale verkitaj de nia fama akademiano kaj majstro D-ro Francisko Szilágyi, pri kies talento la tuta Esperantujo prave fieras. Niaj ambiciaj junuloj ne legu, sed studu ĉiun apartan frazon, por ellerni la lingvon; atentu la aranĝon de ĉiu el la ok rakontoj, por lerni verkarton.

Mi ĵus ricevis diversajn originalajn verkojn en Esperanto, kiuj meritas specialan konsideradon: «Kredu min, Sinjorino!», «Naŭlingva Etimologia Leksikono», «Miru, Pensu, Ridu!», «Retoriko», «Inter Sudo kaj Nordo» estas originalaj verkoj; ili ne ekzistas en alia lingvo, kaj se iam ili aperos en alia lingvo, en tiu nova vesto ili estos nur traduko, kun ĉiuj malavantaĝoj de traduko. Mi konas 10 tradukojn de la eterna «*Divina Commedia*» de Dante Alighieri; en neniuj el ili mi trovas la vivantecon de la originalo; ili ĉiuj estas palaj kadavroj kompare kun la verko de la genia poeto. Mi jam kompilis du legolibrojn por superaj kursoj de Esperanto; neniuj tradukitan frazon mi metis en tiujn volumojn: ili konsistas nur en originalaj tekstoj, ĉar nur tiaj ŝajnas al mi modela, pure Esperanta stilo, vivoplena Esperanto.

La simpla fakto — kiun la mondo ankoraŭ ne atentis —, ke oni verkas rekte en mondlingvo, ke multege da pensoj diskonigis senpere en lingvo apartenanta egalrajte al ĉiuj popoloj, havas profundan signifon por la spirita progresado de la homaro: je la unua fojo en la Mondhistorio la homa penso elkaĝiĝas el ĉiuj geografiaj limoj por superflugi la terglobon per siaj propraj flugiloj, kiel aviadilo, ne kiel papera drako, katenita al iu aparta loko.

La mondo pensas pri Esperanto — se ĝi efektive pensas pri nia lingvo — nur kiel ponto, kiel tradukilo liganta du homojn, kiuj pensas nur en siaj naciaj lingvoj kaj pere de tiu aparato tradukas la vortojn de nekonata en konatan lingvon. En tiu senco Esperanto estus nur «interlingvo», interpretisto sen propraj pensoj kaj vivo, ĉiam alligita al naciaj idiomoj, kies elvolviĝon ĝi devus sekvi, sed ne havus mem sian propran kaj sendependan kreskadon kaj aŭtonoman elvolviĝon.

La ekzisto de originala literaturo montras ion alian multe pli gravan: la homa birdido jam havas siajn proprajn plumojn kaj ekflugas el la nesto tra la blua ĉielo senlima. Tiu originala literaturo formiĝas multe pli rapide ol la mondo opinias: kvankam tre malmultaj kapablas verki originalajn belaĵojn, kiajn verkas iu Szilágyi, ĉiu esperantisto estas ankaŭ originala verkisto; li aŭ ŝi ja skribas leterojn, artikolojn, poemetojn rekte en Esperanto.

En antaŭparoloj de tradukaĵoj, en gazetartikoloj, en leteroj, formiĝas por la estonteco tiu trezoro, kiun la venontaj generacioj scios kolekti kaj profiti.

La belega verko de Szilágyi pelis nian penson foren, en la estontecon kaj ĝin mem ni preskaŭ forgesis!

Memkompreneble oni devas traduki en Esperanton tre multe el ĉiuj lingvoj, ĉar per tradukoj Esperanto alproprigas al si la rimedojn, vortojn kaj parolturnojn, teknikajn esprimojn, provitajn dum jarcentoj en naciaj lingvoj. Per alproprigo de tiuj jam pretaj trezoroj rikoltataj el ĉiuj lingvoj — sumon de la spertoj de sennombraj generacioj — Esperanto iom post iom fariĝos la plej kapabla esprimo de ĉiuj pensoj de la homaro, la nepre necesa instrumento por ĉiuj eminentaj pensuloj. Ni kuraĝigu la tradukantojn, sed plej atente ni studu la originalajn verkojn.

En la bela verko «Inter Sudo kaj Nordo» ĉio estas plej bona: papero, lingvo, preso, bindaĵo. La koboldo Prezeraro tamen aperas kaj mi volas forviŝi ĝiajn piedsignojn por helpi instruistojn, kiuj certe volos meti

## ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

**BÉLGICA** — Grande festa de fraternidade foi o magnífico 35.º Congresso Belga de Esperanto, organizado pela Reĝa Belga Ligo Esperantista, e realizado em Bruxelas, de 12 a 14 de Maio. Presidiu-o o eminente Dr. P. Kempeners, vice-presidente de U.E.A.

**BULGÁRIA** — A Rádio Sofia ampliou suas transmissões em Esperanto. Três vezes por semana irradia notícias econômicas, culturais e políticas.

**CHINA** — Fundou-se no mês de Março, em Pequim, a Ĉina Esperanto-Ligo. A reunião solene de fundação compareceram mais de 100 esperantistas.

**ESPAÑA** — Hispana Esperanto-Federacio, para a festa literária programada por ocasião do 12.º Congresso Espanhol de Esperanto, em Tarrasa (Barcelona), organizou um concurso de literatura esperantista. Temas: poesia lírica e novela curta, originais; e traduções de poesia e fragmento em prosa da língua espanhola.

la libron inter la manojn de siaj progresintaj lernantoj. Jen tabelo de tiuj eraretoj:

<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Eraro</i>	<i>Korektu</i>
8	10	historia	historio
60	4	maturiĝis	maturigis
61	13	konfuziĝis	konfuzigis
62	32	Une	Unu
82	30	defenzivo	defensivo
94	8	maĉgumo	maĉgumo
95	17	ŝi	ĉi
97	5, 7, 12	kentaŭro	centaŭro
98	19	ĝisnun	ĝis nun
99	6	anstataŭigis	anstataŭis
102	7	ŝcioscieco	ĉioscieco
105	4	jarojn	jaroj
118	9	kataklizmo	kataklismo
127	8	komplikaĵoj	komplikaĵoj
143	11	fru	frue
144	2	cikanaĵoj	ĉikanaĵoj
148	2	Eugeno	Eŭgeno
148	16	posedaĵo	posedaĵo
158	2	sunbruniĝita	sunbrunigita
167	14	milito	milito.
170	8	brunajn,	brunaj
171	3	ĉiŭ	ĉiu
181	5	ofenzivo	ofensivo

I. G. B.

— *Sabadell* — Só há poucos meses começou a funcionar, desde a guerra civil espanhola, o grupo esperantista de Sabadell, que tem sua atual sede na “Cooperativa la Sabadellense”, à rua General Mola, 99.

**ESTADOS UNIDOS DA AMÉRICA DO NORTE** — O Colégio de Elisabethtown, Universidade do Estado de Pensilvânia, recebeu, por testamento da Sra. Emma C. Lander, há pouco falecida, o donativo de 15.000 dólares, destinados a serem utilizados no ensino do Esperanto. A Universidade começará a ensinar Esperanto no outono deste ano.

**FRANÇA** — *Angers* — O Conselho Municipal resolveu dar a uma nova rua desta cidade a denominação de *Rue du Docteur Zamenhof*.

**GRÃ-BRETANHA** — O 35.º Congresso Britânico de Esperanto realizou-se em Ipswich de 11 a 14 de Maio. Como de costume, houve muito entusiasmo entre os numerosos congressistas, venda avultada de livros esperantistas, exposição literária e filatélica, reuniões, fotos, boas comidas, concertos, cerimônias religiosas, excursões.

**GUATEMALA** — Entre os cursos, que a Universidade de San Carlos de Guatemala organizou para the Summer School (Escola de Verão), conta-se o Esperanto, que será dirigido pelo samideano Dr. Jules Bonge. São admitidos alunos dos países da América. Sobre o assunto nosso samideano Bonge distribuiu circulares redigidas em Esperanto, com os esclarecimentos necessários aos interessados.

**GUINÉ ESPANHOLA** — Na povoação Banapá, nas proximidades de Santa Isabel, capital da Guiné Espanhola, em longínquo ponto da África, brilha a estrêla esperantista. Conta-nos o “Boletim de la Federacion Esperantista Española”, de Valência, que nosso samideano Felikso de Valois Arana, até há pouco o único esperantista naquele território, professor da Escola Superior Indígena, abriu um curso de Esperanto no Seminário Indígena, em Banapá; e 34 seminaristas negros, entre 16 e 30 anos, seguem o curso, com grande interêsse. O Sr. Arana pretende dirigir outro curso na Escola Superior Indígena, e sonha até com uma futura Gvineia Esperanto-Asocio.

**HOLANDA** — F.L.E. — “Asocio de Laboristaj Esperantistoj “Fidu la estontecon” festejou seu 40.º ano de existência. Fundada em 1911, tinha em 1918 menos de 200 membros, e hoje conta 5.200.

Em 1937 F.L.E. estabeleceu “Literatura Komitato”, para o contróle da língua, em manuscritos a ser editados. Tem duas gazetas: “Laborista Esperantisto” para informações e propaganda do Esperanto; e “La Progresanto”, para estudo da língua. Como edição jubilar publicou a tradução em Esperanto da peça teatral de grande sucesso — “La mondo ne havas atendejon”.

O *Hotel Aristo*, em Rotterdam, Witte de Withstraat 496, está distribuindo cartões de anúncio, com dizeres em holandês, de um lado, e em Esperanto, do outro lado; e cartões arredondados para as malas, com as cores nacionais da Holanda e, na faixa branca, estrêla verde e frase: "Paco per Esperanto".

ITALIA — Continua intenso o movimento em prol do Esperanto, em todo o país, especialmente nas seguintes cidades, onde se realizam cursos e conferências: Reggio Emilia, Bolzano, Nápoles, Brescia, Pavia, Lucça, Gênova, Florença, Milão, Bolonha, Forli, Verona, Roma.

Por ocasião da Beatificação do Papa Pio X, será publicada pelo editor A. Paolet uma biografia popular em Esperanto desse Papa. Prepara-a o Dr. Adolf Halbedl.

Sicilia — Efetuou-se em Maio a Unua Kunveno de la Siciliaj Esperantistoj, em Catânia. Por ocasião dessa primeira reunião dos esperantistas sicilianos, "Brazila Esperantisto" recebeu interessante cartão, com o mapa da Sicilia, anotando as cidades em que há esperantistas, assinado por vários samideanos.

JAPÃO — Com o desaparecimento de Japana Esperantista Asocio não mais aparecerá seu órgão "Nova Fronto", por dificuldades financeiras. Em substituição, a nova organização Esperanto-Tomono-Kai (Sociedade de Amigos Esperantistas) começou a editar a nova gazeta "Samideano", cujos dois primeiros números já recebemos.

POLÔNIA — No dia 15 de Abril, em que se passou o 34.º aniversário da morte do Dr. Zamenhof, esperantistas de Varsóvia reuniram-se junto ao túmulo de *nia majstro*, colocando uma bela coroa de flores, com o dístico: "Al kreinto de Esperanto — Pollanda Esperantistaro". Oraram diversos esperantistas, e terminaram a tocante cerimônia cantando o hino "La Espero".

PORTUGAL — A circular n.º 2.167, de 11 de Agosto de 1948, endereçada às Polícias de Segurança Pública e de Informações e Defesa do Estado e aos Serviços de Censura, e que proibiu a propaganda do Esperanto, o livre trânsito de cartas e gazetas esperantistas pelo correio, etc., finalmente foi anulada, graças aos esforços e à persistência de nosso valoroso samideano Saldanha Carreira.

O Ministro Dr. Trigo de Negreiros, depois de estudar a documentação que Saldanha Carreira fornecera ao Dr. Armando Larcher, diretor geral dos Serviços de Censura, convenceu-se da neutralidade do Esperanto e de sua necessidade para as relações internacionais, e em data de 12 de Abril de 1951, anulou a resolução

## SÉRIE "LA EPOKO"

Leitura interessante para as horas de lazer

1. MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO. *Agatha Christie. Tr. Etulo.*  
Romance de mistério e atração.
2. LA KNABOJ DE PAŬLO-STRATO. *Francisko Molnár. Tr. L. Spierer.*  
História para os moços e os menos moços.
3. LA PRINCO KAJ BETTY. *P.G. Wodehouse. Tr. G. Badash.*  
Peripécias, em Londres, do príncipe de uma ilha.
4. LA TEMPO-MAŜINO kaj LA LANDO DE LA BLINDULOJ. *H.G. Wells. Tr. E.W. Amos.*  
Viagem ao futuro.
5. PRINCINO DE MARSO. *E.R. Burroughs. Tr. K.R. Sturmer.*  
O autor de «Tarzan» leva a Marte um oficial norte-americano.
6. COLOMBA. *Prosper Mérimée. Tr. J. Beau.*  
Empolgante romance de vendetta corsa.
7. SEP VANGOFRAPOJ. *Karlo Aszlanyi. Tr. L. Spierer.*  
Um engenheiro promete, em vingança, sete bofetadas a um ricoço.
8. LA VIRINETO EN BLUO. *Original de Mason Stuttard.*  
Contos variados: leves e sérios.
9. BRULANTA SEKRETO. *Stefan Zweig. Tr. K.R. e P.E. Schwerin.*  
Fascinantes contos de fundo psicológico.
10. KISO DE LA REGINO. *I.F. Najivin. Tr. D. Staritsky.*  
Aventuras de amor no Congo Belga.

CADA VOLUME,

com excelente apresentação — Cr\$ 15,00

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

do ministro, seu antecessor. Pela carta dirigida ao redator de "Heroldo de Esperanto", da qual extraímos as linhas acima, vê-se que os samideanos de Portugal não cabem em si de contentes, e com razão. Carreira declara: "Ni naĝas en plena ĝojo!".